

& La ĉevalo kaj la azeno:

< Rekante 13 el 29 batoj por strofo, entute 174 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:29> (

/La LaLa LaLa SoLa Ti La;La Ti La; La doLa SoSo SoSo Ti La;La Ti La;

(#Rekantaĵe: do do TiLa So; TiLa La; do do TiLa So; TiLa La a)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 /Sen ŝarĝo la ĉeval' promenis ; fiere. ;
Post ĝi azeno ŝarĝon trenis ; sufere,

(×:; **Gaje paŝu nun ; en la ĉen ; ĝis
leviĝos sun' ; en maten'.**)

'2 kaj ĝeme petis: Kamarado, ; min
helpu! ; Ne lasu, ke min la penado ;
elĉerpu!

'3 Vi la duonon portus lude, ;
transprenu, ; ke mi, ŝarĝita tiel krude, ;
ne svenu!"

'4 Sed ridis la ĉevalo, vanis ; la voko, ;
orgojle dancis ĝi, rikanis ; kun moko,

.....

'5 ĝis la azen' la penon jam ne ; elportis,
; ekstumblis, falis, blekis: "Damne!" ;
kaj mortis.

'6 Nun devis porti tiu orgojla ; la
plenon ; de la azena ŝarĝo — kaj la ;
azenon.)